

1. Kiel vi priskribus L-on, se iu demandus al vi pri kio ĝi celas kaj laboras?

Viko:

Estas grupo ekanĝita de Angela Tellier, pro mendo de ESF, kiu celas pligrandigi la ĉeeston de Esperantaj kursoj kaj interlingvistikaj studoj ene de la universitatoj.

Renato:

Revigligi la agadon de la Esperanto-movado en universitatoj.

Radojica:

Kerna subgrupo de la Universitata Komisiono de ILEI, instigita de ESF por progresigo de la universitata agado de Esperanto-komunumo.

Elisee:

Tiu cxi grupo estas ia komisiono kies membroj estas fakuloj kiuj celas promocii Esperanton en la akademia sfero.

Angela:

Celas antauxenigi la progreson de E-o kaj interlinkvistiko en universitata medio - lernadon, instruadon, esploradon, informadon.

2. Laŭ viaj preferoj, ĉu vi aldonus, forjetus, modifus ion rilate al grupa celaro?

Viko:

Mi preferas pensi, ke tia mendo partoprenas pli grandan celon, nome esperantigi la universitaton: stimuli la uzon de Esperanto kiel lingvo por scienca komunikado, universitataj interŝanĝoj, internacieco de la studobjektoj ktp.

Renato:

Ne, se la celaro esas tiu, kiun mi priskribis en la antaŭs respondo.

Radojica:

Fakte mi pensis demandi, diskutigi inter ni ĉi tion: ĉu ni havas komunan ideon pri kio estas niaj celoj, kion ni volas per L? Komence tio ŝajnis klara per si mem, sed kun disvolviĝo de la diskutoj montriĝas malsamaj perceptoj kaj perspektivoj.

Mi mem vidas la L-an celaron, pli-malpli, tridirekte:

-- koncepti en ĝenerala perspektivo kaj listigi por longdaŭra konsidero: kio dezirindas, bezonatas kaj fareblas en la kampo de universitata agado

-- subteni kio jam estas farata kaj entrepreni/kuraĝigi kio tuj ekfareblas

-- daŭropove, celutile kaj ne redunde registri kaj videbligi la planojn, laborojn, agantojn kaj atingojn

Sed kion konkretan ni celas mallongdaŭre kaj mezlongdaŭre: Kian ŝanĝon en la universitata agado ni volas vidi post unu jaro, aŭ post tri jaroj kompare kun la nuna stato?

Kaj alia aspekto: kiun amplekson de la universitata agado ni celas? Laŭ mia kompreno:

+ universitata instruado kaj studado de Esperanto kaj interlingvistiko inkluzive de la pedagogio de Esperanto

+ interlingvistika esplorado

+ utiligado de Esperanto por aliaj bezonoj kaj celoj de universitatoj kaj universitatanoj (komunikado, publikigado, interesgrupoj)

+ aliaj agadoj de esperantistaj universitatanoj ligite al aŭ sendepende de ilia esperantisteco

Elisee:

Ne vere, krom ni devas havi bugxeton, mobilizi resursojn aux monrimedojn por fari ion konkretan. Sed rimedoj nia rolo estos utopia.

Angela:

Momente ne, sed ni nur jxus komencis.

3. Kaj rilate al grupa maniero labori?

Viko:

Ĝenerale tute bone. L havas membrojn kiuj vere aktivas. Eble estus bone eksperimenti malsamajn manierojn. Ekzemple: oni povas labori rete per malgrandaj taskoj, danke al kio oni havos rezultojn antaŭ la renkontiĝo. En ĝi, oni diskutos la konkludojn de la laboroj jam faritaj ekde la lasta virtuala renkontiĝo.

Renato:

Skajpo kaj nun ankaŭ listo estas bonaj laboriloj. Ni deva trovi aliajn homojn por formi laborgrupon pri ĉiu tasko.

Radojica:

La grupa rezulto dependas de individuaj kontribuoj kaj ilia kohereco. Ni ne estas formala grupo kaj tio limigas la eblecon apliki iujn mekanismojn kaj rimedojn de teama laboro (ekz. projektplanado kaj mastrumado), sed akordigita kompreno de la komuna movada intereso povas esti ŝlosila por la sukceso.

Elisee:

Virtualaj grupoj havas malfacilan labormanieron, sed almenaŭ ni provas. Ni ne multoblige virtualajn renkontigojn, laŭ mi unufoje monate sufiĉus. Se ni scias, kion oni atendas de ni kaj se rimedoj estas disponeblaj, ni povas labori mem sen renkontigi. Estas nur opinio...

Angela:

Sama respondo - momente virtualaj kunvenoj estas la plej bonaj pro tio ke ni ĉiuj logxas en malsamaj landoj; tamen facilas starigi ankaŭ subgrupojn por kunlabori pri aparta(j) temo(j).

4. Kiu estas via rolo ene de L?

Viko:

Mi engaĝiĝis pri kelkaj, sed mi sentas, ke la komunikado ne bone funkcias. Alivorte, kelkaj el la grupo pensas, ke mi engaĝiĝis pri A, sed mi pensas, ke temas pri B. Pro tio mi sentas, ke eble ni tro kuris la unuan renkontiĝon. Laŭ mia sinteno, mi respondecas pri ideoj (kaj iliaj priskriboj), kiuj havas sencon ene de strategio, kaj labori por realigi ilin. Laŭ L mi pensas, ke mi respondecas pri virtuala seminario, esplorado pri fiasko de kursoj, kaj maniero allogi studentojn per stipendioj.

Renato:

Zorgi por ke estu en la mondo pli da kursoj pri Esperanto en universitatoj.

Radojica:

Difininda.

Por nun:

- partopreno en evoluigo de ideoj kaj planoj
- plua prizorgo de tio, kion mi jam gvidas en la sfero de universitata agado.

Elisee:

Mia rolo estas reprezenti Afrikon kaj prezenti projekton pri Esperanto ĉe la Universitato.

Angela:

Mi reprezentas ESF kiel kunordiganto de Uni-aferoj, kaj pro tio volonte laboras tiucele kun ILEI kaj ILEI-anoj kaj aliaj kiuj samcele pensas kaj laboras; ne nur, mi havas grandan personan intereson en la laboro.

5. Kion L bezonas por sukcese atingi siajn celojn?

Viko:

(1) Ke la grupo havu rezultojn, kiuj kontentigu membrojn; (2) ke Esperantujo apogu L-on pere de pli da kunlaborantoj, instituciaj apogoj (ekzemple, disvastigo, kontaktoj, administrada helpo ktp), eĉ mona apogo laŭ konkretaj projektoj; (3) ke la rilato kun esperantistoj universitatanoj fartu bone, kaj ne stariĝu grupetoj kiuj anstataŭ kunlabori praktikos bremsadon aŭ konkuradon.

Renato:

Multajn kunlaborantojn.

Radojica:

Paciencon kaj reciprokan subtenon de L-anoj.

Efektivan subtenon de ESF kaj ILEI.

Elisee:

Ni bezonas monon, kaj krom virtualaj renkontigxoj, ni bezonas agotagon pli praktika kie ni sendos niajn komisionanojn labori en konferenco, prezenti, prelegi, ktp.

Angela:

Tion ni ne povas nun scii, mi kredas - devas vidi kiel evoluas aferoj dum la venontaj kelkaj monatoj.

6. Kiujn aliajn estaĵojn vi konas, kiuj iom similas al L?

Viko:

1. ILEI komisiono; 2. UEA io (pri kio respondecas Stephan McGill); 3. AIS; 4. IKU; 5. Universitato de Esperanto zorgata de Denis Keefe; 6. Retlisto Universitato zorgata de Renato Corsetti.

Renato:

La universitatan komisionon de ILEI, praktike neagantan pro la troa okupiteco de Duncan Charters. CED-on, kaperitan de ESF kaj nur eldonantan la revuon LPLP.

Radojica:

Laŭ la organiza formo kaj labormaniero:

Eble iama E@I en sia komenca fazo, komence de ĉi tiu jarcento. Tamen de longe ĝi jam estas io alia.

Aŭ siatempa teamo de DESKF (Danubregiona Esperanta Scienca kaj Kultura Forumo) iniciatita de karmemora Prof. Bociort.

Kontinentaj/regionaj komisionoj de UEA.

Elisee:

Nenio

Angela:

Cxu vi celas esperantajn aux ne-E-ajn?

7. Aldonu tion, kion vi dezirus rilate al tiu temo.

Viko:

Nenio nun.

Renato:

Klaran subtenon de ILEI, kiu estas la sola, laŭ mi, kiu havas la rajton kaj la devonalvoki al la esperantistoj fari ion en ĉi tiu kampo, kaj de UEA (sed UEA de longa tempo ne plu interesiĝas pri disvastigo de Esperanto).

Radojica:

-

Elisee:

Ni devas scii la rolon de cxiu kaj havi specifajn taskojn por cxiu por ke ni povu iam raporti. Miaopinie tio marsxos pli efike.

Angela:

Mi firme kredas ke kune ni havas grandan sxancon antauxenigii niajn celojn.